Mia ideo estas, ke SAT fariĝu kunfandaĵo aŭ centro (se oni volas eviti la vorton Internacio) de la LEA-oj kaj tiuj estu landaj sekcioj de SAT. Per tio ĉio estus simpligita. Ĉiu LEA-ano samtempe estas SAT-ano. Duoblaj kotizoj ne ekzistas. La LEA-estraroj kune formas la SAT-direkcion. Por la LEA-oj decidas ties membronombroj. La gazeto „Sennaciulo“ povus atingi eldonkvanton de pli ol 10.000 ekz. Ĝi estu liverata por la memkostoj al la LEA-oj por disdono. Ĉiu laborista esperantisto havus la organon. La movado ne devus fariĝi negocata. Kompreneble la komunistaj organizaĵoj, kiuj ne deziras kunlaboron kun aliaj tendencoj, ne aliĝos al la nova SAT. Ili ja fondis sian propran Internacion.

Mi scias, ke oni verŝajne respondos, ke tian aranĝon ne permesas la statutoj de SAT. Nu, statutoj ja ne estas poreterne, oni povas ŝanĝi ilin. Mi havas la konvinkon, ke SAT nur povas prosperi, se ĝi baziĝas sur la landaj organizaĵoj. La nuna situacio klare montras al ni la malsukceson en la alia organizformo. SAT povus akiri eminentan progreson per reorganizo. Ni vidu la faktojn per malfermitaj okuloj kaj ne imitu strutan taktikon...“

D. Rasztozky, Wien.

„...Tre bone estas eble, tiel ŝanĝi la organizformon de SAT, ke ni ricevas uzeblan kaj laborkapablan ligan tutmondan... Ankaŭ ne estas necese, ke tiu organizacio estu „socialdemokrata“. Sed ian orientiĝon ja ni devas havi. Ĉar ni ne praktikas politikon, sed faras kulturalan laboron, la orientiĝo al unu vasta direkto — ĝi estu por ni la socialista, ne estas malfacila... El la individua membreco sekvas, ke estas senrajtigitaj la membroj. La decidoj de la kongresoj estas farataj de nombro da anoj, kiuj hazarde havas monon kaj tempon... La posta korektigo per referendumo estas necerta afero. Se propono estas malakceptata, tia referendumo nur estas ebla (laŭ nuna statuto), se 2/10 plus 100 de la tuta anaro ĝin postulas. Do ĉe membrostato de ekz. 2000 minimume 500 anoj devas subteni la postulon... La dispartigo en membrojn



Vizaĝmasko de Goethe
farita en la jaro 1816 de Schadow

aktivajn kaj pasivajn estas vera klasa ordo: kiu havas monon kaj povas pagi la altan kotizon por membroj-abonantoj, tiu ankaŭ rajtas partopreni je voĉdonoj, esti funkciulo. Kiu ne havas monon (senlaborulo, laboristo kun malalta salajro), tiu povas esti plej aktiva esperantisto kaj SAT-ano, li laŭ statuto estas „pasiva“, ne havas rajtojn.

Kiom longe mi estas SAT-ano, tiom longe mi kontraŭas ĝian organizformon. Ĝuste la komunistoj min kontraŭbatalis, al kiuj „sennaciismo“ ŝajnis revelacio. Nun ili ŝanĝis la fronton...“

Adolf Sproeck, Berlin (SAT-ano 866).

Fruktoj de nia korespondado

La hispana respubliko

La hispana respubliko iom ŝanĝis depon mia lasta informo. Respublikanoj kaj reakciuloj unuiĝis por daŭrigi la subpremadon de la popolo laŭ pasintaj tempoj.

La provincestroj-reakciuloj obeas al antikvaj politikuloj kaj montras sin surdaj al petoj de la popolo. En malgranda vilaĝo la civilgardistoj atakis manifestacion de kamparanoj. Ĉi tiuj ribelis kaj mortigis kvar civilgardistojn. Tridek kamparanoj estis kaptitaj kaj terure turmentitaj.

Post kelkaj tagoj, en granda vilaĝo oni faris manifestacion, festan, ĝojan, pacan. Subite la civilgardistoj fimanere pafis kontraŭ la manifestacio, mortigante virojn, virinojn kaj infanojn. La indigno estas grandega. Kelkaj patroj vidante siajn infanojn mortintaj, furioziĝis. En kelkaj provincoj okazis ĝenerala striko.

Feliciano Martin, Madrid.

LA PAĜO POR LA LERNANTO

Gvidas k-do F. Scheibenreiter

Viel Schwierigkeiten macht uns noch der 4. Fall (die n-Endung). Wir wollen daher einmal wiederholen, wann wir den 4. Fall setzen müssen. Zuerst die einfachste Anwendung:

Ich liebe die Genossin — mi amas la kamaradinon.

Die Katze fängt die Maus — la kato kaptas la muson.

Wir kauften Äpfel — ni aĉetis pomojn.

Merkt Euch gut: Kann ich „mich“ oder „dich“ einsetzen, dann ist die n-Endung zu gebrauchen, also „ich liebe die Genossin“ (ich liebe dich), daher „mi amas la kamaradinon“.

Bei Angabe eines Maßes, Gewichtes oder Preises setzen wir auch den 4. Fall. Beachtet die Beispiele und die Fragen, auf die der 4. Fall folgt:

Das Zimmer ist 4 m lang (wie lange?) — la ĉambro estas longa kvar metrojn.

Die Wurst wiegt 2 kg (wieviel?) — la kolbaso pezas du kilogramojn. Der Baum ist 12 m hoch (wie hoch?) — la arbo estas alta 12 metrojn.

Die Frage nach dem Alter lautet: kiun aĝon vi havas — welches Alter haben Sie? Mi havas tridek jarojn (sehr gebräuchlich ist: „mi estas tridekjara“).

Der 4. Fall ist auch auf die Frage „wann“ bei Datumsangaben anzuwenden. Beispiele: am 5. April — la kvinan de Aprilo; er starb am 22. März — li mortis la 22an de Marto; die Bundesversammlung fand am 27. und 28. März in Steyr statt — la liga plenkunveno okazis la 27an kaj 28an de Marto en Steyr.

Die Angabe der Dauer einer Handlung oder Tätigkeit wird ebenfalls durch den 4. Fall ausgedrückt, z. B.: der Regen dauerte 3 Stunden — la pluvo daŭris tri horojn.

Auch sogenannte indirekte Ergänzungen lassen sich mit dem 4. Fall ausdrücken, z. B.: ich beharre bei meinem Entschlusse — mi persistas mian decidon (anstatt je mia decido). Glaube ihm nicht — ne kredu lin (anstatt al li)!

In den Grußformen finden wir — wie Ihr ja alle wißt — auch den 4. Fall, z. B.: guten Tag — bonan tagon; fröhliches Fest — gajan feston! Die Grußformen sind verkürzte Sätze; der vollständige Satz soll nämlich heißen: ich wünsche Dir einen guten Tag, daher der 4. Fall.

Für heute wollen wir dieses Kapitel schließen. Uebt fleißig und sucht neue passende Beispiele!

Eigenschaftswort und Umstandswort

Beide sind in der deutschen Sprache fast immer gleich und werden deshalb bei der Uebersetzung ins Esperanto oft verwechselt. Denn hier müssen wir ja streng unterscheiden zwischen den Endungen *a* und *e*.

Das Eigenschaftswort ist immer an ein Hauptwort gebunden, es ist eine nähere Bestimmung zum Hauptwort. Es antwortet auf die Frage „was für ein?“ (*kia*). Es wird abgewandelt wie ein Hauptwort und bekommt wie dieses auch die Mehrzahlendung:

La ruĝa flago la ruĝaj flagoj
La ruĝan flagon la ruĝajn flagojn

Das Eigenschaftswort kann auch zusammen mit dem Hilfszeitwort die Satzaussage bilden. Auch dann bleibt es Eigenschaftswort:

la flago estas ruĝa, la flagoj estas ruĝaj

Wichtig ist, daß, wenn an Stelle eines Hauptwortes ein Fürwort steht, ebenfalls *a* bzw. *aj* geschrieben wird:

Tio estas bona.

Mit Absicht ist gerade dieser Satz als Beispiel gewählt, weil gerade nach *tio* sehr häufig *bone* usw. geschrieben wird.

Das Eigenschaftswort ist also eine nähere Bestimmung zum Hauptwort, das Umstandswort eine nähere Bestimmung zum Zeitwort. Das sagt schon die lateinische Bezeichnung *Ad-verb* = zum Zeitwort gehörig. Es hat die Endung *e* und bleibt unveränderlich. Es antwortet auf die Frage „wie“, „auf welche Weise“ (*kiel*):

La knabo iras rapide.

Das Wort *rapide* bezieht sich auf das Zeitwort *iras*.

Das Umstandswort beantwortet auch die Fragen „wo“ (*kie*), bzw. „wohin“ (*kien*) und „wann“ (*kiam*), d. h. ich kann an Stelle eines Hauptwortes mit Verhältnisswort oft ein Umstandswort setzen:

Mi estas en mia hejmo = mi estas hejme (*kie*)

Iru al nordo = iru norden (*kien*)

Venu je dimanĉo = venu dimanĉe (*kiam*)

Sätze wie oben (*tio estas bona*) werden oft als „unpersönliche Sätze“ angewandt: Es ist gut, es wird gemacht werden. Dieses unpersönliche „es“ wird in Esperanto nicht übersetzt. Und man schreibt dann:

estas bone estos farate

Das Umstandswort steht überhaupt oft an Stelle eines Hauptwortes mit Verhältnisswort:

kun escepto escepte

pro kaŭzo kaŭze
je respondo responde

Merke: Das Umstandswort kann wohl an Stelle eines Hauptwortes, nie aber als nähere Bestimmung eines solchen stehen. Die nähere Bestimmung zu einem Hauptwort hat als Eigenschaftswort die Endung *a*, nie *e*! A. Sproeck.

Traduk-Tasko n-ro 1

La ĥemia¹ industrio ne nur pro la venengasoj estas necesa, sed ankaŭ pro la pulvo². La elemento de la eksplodigiloj³ estas la sama kiel tiu de la pandona⁴ artefarita sterko⁵: la azoto⁶ — vivo kaj morto estas produktataj⁷ en la sama fabriko⁸. Ĉar Germanio dum la mondmilito ne povis havigi al si azotohavajn⁹ krudmaterialojn¹⁰, ĝiaj progresintaj ĥemia industrio kaj tekniko eltrovis la azotakiron¹¹ el la aero¹². Post la milito ĝiaj azotofabrikoj estis ŝanĝataj¹³ por produktado de artefarita sterko. Sed en eksterlando tiu speco de sterkoproduktado¹⁴ ankaŭ estis akcelata¹⁵, por havi¹⁶ en milita kazo¹⁷ eksplodigilfabrikojn kun sufiĉe granda produktopovo¹⁸. Per importmalpermesoj, altaj protektdoganajoj tiu industrio estis progresegigata¹⁹, ekestis troproduktado, oni provis aranĝi internaciajn interkonsento-kontraktojn²⁰, la konvencio estis rompata²¹ — sur la kampo²² de la produktado de artefarita sterko nuntempe²³ regas plena ĥaoso²⁴.

1 Ne: kemia. 2 Sufiĉas: pulvo (ne: papulvo). 3 Ankaŭ: eksploda materio. 4 Eble: grenkreskiga. 5 Ne: artsterko. 6 Aŭ: nitrogeno. 7 Ankaŭ: fabrikataj. 8 La vorto „uzino“, kiun enkondukis precipe sovetianoj, estas tute ne bezonata. 9 Ankaŭ: azotozajn. 10 Ankaŭ: krudaĵojn. 11 Ne: azotogajnon. 12 Aŭ: elaeran. 13 Aŭ: transformataj, modifataj. 14 En tiu frazo la esprimo „artefarita sterko“ ne plu estas nepre necesa, ĉar tio jam klariĝas el la antaŭa frazo. 15 Ankaŭ: favorata. 16 Ankaŭ: posedi. 17 Ankaŭ: okaze de milito. 18 Ankaŭ: kapacito. 19 Ankaŭ: kreskegigata, intense progresigata. 20 Aŭ: kartelkontraktojn. 21 Aŭ: detruata. 22 Aŭ: en la lako. 23 Pli bone ol: hodiaŭ. 24 Pli bone ol: anarĥio.

De tiu ne facila tasko alvenis 22 tradukoj (15 el Aŭstrio, 7 el Germanio). Premiojn ricevas: 1. K-do Franz Stein, Mainz. 2. Rich. Reisenauer, Lahnsattel. 3. La partoprenintoj de la kurso por komencantoj ĉe SEA-grupo Worms a. Rh.

Stila tasko

Por ebligi al studemaj gek-doĵ linĝvan ekzercadon kaj samtempe okupi ilin per grava problemo, ni prezentas kiel stilan taskon la temon:

Kiel oni povus progresigi la laboristan esperantomovadon?

La skribontoj tute kuraĝe diru sian opinion pri observitaj malfortaĵoj de nia movado kaj pri ĉiuj ebloj, kiuj estus aplikendaj por la sukceso. Ne hezitu kaj konigu viajn ideojn! La plej interesa letero estos publikigata kaj premiata.

SEA - Genossen! Achtung!

Im „Arbeiter-Esperantist“ Nr. 3 erschienen folgender Artikel:

Einige Fragen an die Mitglieder des sozialdemokratischen Esperanto-Bundes.

Der Vorstand des „SEA“ hat die Herausgabe des Lantischen „Proletarischen Esperantismus“ in deutscher Sprache beschlossen.

Was sagt ihr zu der Herausgabe einer offen antimarxistischen und proimperialistischen Broschüre durch euren Vorstand? Sollen eure Mitgliedsbeiträge für antiproletarische Literatur verpulvert werden?

Dieser Artikel muß Ansporn sein für jeden SEA-Genossen, die Broschüre zu lesen und zu verbreiten. SEA-Genossen! Ja, Ihr müßt wissen, für was der Bundesvorstand Euer Geld ausgibt. Ueberzeugt Euch, daß das Urteil des Artikelschreibers im AE von keiner Sachkenntnis getrübt ist. Wir können ja auch nicht von jedem verlangen, den Gedankengängen eines Lanti zu folgen.

Genossen! Bestellt die Broschüre „Der Arbeiter-Esperantismus“ bei der Bundesgeschäftsstelle Frankfurt a/M. 21, Heerstraße 85. Pro Exemplar 0.30 Pfg. Gruppenrabatt 10 Prozent.

Weiters heißt es in obigem Artikel des AE:

Der Parteivorstand der SPD hat zwar nichts für Esperanto übrig, fordert aber seine Anhänger auf, ihre Stimme dem Nationalisten Hindenburg zu geben.

Was sagt ihr zu der Hindenburgkandidatur eures Parteivorstandes? Werdet ihr euren Parteivorstand oder dem Ruf der Roten Klassenfront folgen und Thälmann wählen? Wie stellt sich euer Bund offiziell zu der Reichspräsidentenwahl?

Wir haben darauf zu erwidern: Als SEA-anoj ist es uns vollkommen gleich, was der Vorstand der SPD für einen Vorschlag zur Reichspräsidentenwahl macht. Die SPD-Mitglieder, die unserem Bund angehören, müssen das Für und

Wider dieses Vorschlages in ihren Parteiversammlungen erwägen.

Der Bundesvorstand des „Sozialistischen Esperantobundes“ enthält sich jeder Aeußerung zur Wahl, da diese eine Angelegenheit jedes Einzelnen ist. Auch liegt es uns fern, unser Bundesorgan zu benutzen, um unsere Mitglieder irgendwie zu beeinflussen, wie es der Arbeiter-Esperantist“ in dem Leitartikel der Märzzeitung tut, indem er offen zur Wahl des kommunistischen Kandidaten Thälmann auffordert. Das ist Neutralität!

Weil wir keiner Partei verpflichtet sind, haben wir es nicht nötig, unser Bundesorgan zum Sprachrohr einer politischen Partei zu machen wie es der AE ist, sondern können es uns leisten, eine neutrale Esperantoorganisation innerhalb der modernen Arbeiterbewegung zu sein, die allein den Mitgliedern eine gedeihliche Zusammenarbeit mit Angehörigen anderer Arbeiterparteien gewährleistet.

Der Bundesvorstand**Sciigoj de ALLE - estraro**

Wien XXI, Angererstraße 14 (Arbeiterheim)

Kelkaj k-doj intencas fondi proletan E-teatron. Interesemuloj, kiuj volas aktive kunagi, sin turnu al la sekretariejo.

Grupraportoj

Landestraro por Stirio. La ĉijara landa plenkunveno okazos la 8an de Majo en Bruck a. M. en infanamika hejmo. Ĉiuj grupoj estas petataj, sciigi al k-do Hermann, Eggenberg bei Graz, Seidenhofstr. 54, la nombron de la delegitoj kiel eble plej baldaŭ. Proponoj de la grupoj devas esti sendataj ĝis plej malfrue la 24an de Aprilo al la sama adreso. Eksterstiraj gek-doj, kiuj deziras partopreni nian plenkunvenon, estas kore invitataj, sed ili bonvolu anonci sian partoprenon.

Knittelfeld. La jarkunveno okazis la 28an de Januaro. Malgraŭ la krizo la grupa vivo estis vigla. Kelkaj k-doj vojaĝis eksterlanden. La grupo pasintjare estis vizitata de k-do Johansson el Svedio. Kasostato S 126'80. Membrostato 22. La gazetservano k-do Greitner sukcesis publikigi E-kurson en „Aichfelder Zeitung“. Novelektitaj estis: estro k-do Zuber, kasanto k-do Peisl, sekretario kaj gazetservo k-do Greitner, biblioteko k-dino Illmaier. La grupvesperoj okazas ĉiŝaŭde. Grupadreso: K-do Thomas Zuber, Knittelfeld, Landschach 4.

Linz. La 19an de Januaro okazis nia jarkunveno. kiun partoprenis ĉirkaŭ 42 personoj. El la raportoj estis videbla la brila stato de nia grupo. La reelektio pasis rapide. Ĉiuj konsentis, ke la estinta estraro estu la estonta. La estraro konsistas el estro Mittermayer Franz, kasisto Nöbauer Franz, protokolanto Fessl Josef, bibliotekisto Höller Franz, presservo Fux Rosa. Ĉe la lasta punkto „eventualaĵoj“ la situacio iom akriĝis. Ankaŭ en Linz fariĝis moderna la splitigo de la ekzistanta laborista grupo. Kaj tiu ĉi temo kaŭzigis viglan maltrankvilon. Unu el la „aliaj“ disŝiris sian ALLE-membrokarton kaj deklaris sian ekŝiĝon. Sed la grupo zorgos, ke la praktika laboro ankaŭ estonte daŭros. Por disputemuloj ne estas loko en niaj vicoj.

Schwechat. La 9an de februaro okazis nia plenkunveno. Elektaj rezultis: estro k-do Hanaček, kasanto k-do Polaček, korespondanto k-do Niederreiter, bibliotekanto k-do Bretschneider, kontrolanto k-dino Kühbauer kaj k-do Spirik. Korespondadreso: Hans Niederreiter, Öst. Metallhüttenwerke, Schwechat.

Wien. Grupo III. La kurso por komencantoj, gvidata de k-do Bohrer, kontentige daŭras.

14 kursanoj jam aliĝis al la grupo. La grupo devis ŝanĝi la kunvenejojn. La nova grupejo estas en III, Rabengasse 5/36/1. Kunventago: Ĉiumarde, 19a—21a horo.

Grupo VI. La grupvespero okazas ĉiŝaŭde je la 20a, en VI, Sandwirtgasse 2. Programo por Aprilo: 7.: Nia liga plenkunveno 1932 (Krydl); 14.: Goethe (Schauhuber); 21.: Miaj travivaĵoj en Norvegujo (Scheibenreiter); 28.: Gramatikaĵoj (Fischer). Gastoj bonvenaj!

Grupo X. La jarkunveno okazis la 12an de Februaro. Membrostato 81, kasostato S 583 05, nia biblioteko enhavas 94 librojn. La dumjara grupvizitado estis kontentiga. Novelektitaj estas jenaj k-doj: estro Ekstein, kasantino Kaniak, por libroŝparado k-do Gadek, sekretario Beyer, bibliotekanto Hannak.

Grupo XII. La 25an de Februaro okazis nia jarkunveno. La grupo okazigis 48 grupkunvenojn kun entute 1440 vizitintoj, krome 11 estrarkunvenojn. Enspezoj estis 876'83, elspezoj S 711'56, saldo S 165'07. 36 ŝparemuloj ŝparis nunjare S 164'51. Elektitaj estis jenaj gek-doj: estro Sykora, sekretario Kurz, kasantino Sykora, bibliotekantoj ge-Eisler, libroŝparado Michl, kontrolo Hlavacek kaj Runca.

Tramista Fakgrupo. La 28an de januaro okazis nia jarkunveno. Estro Kacimbersky saluis la alvenintajn gastojn, la k-dojn profesoro Simon kaj Stöckl de ALLE, Neumüller de tramista centra kleriga komitato, Dietrich de konfidenciula komitato de la trama ĉefirparejo, Winter de Radio-sekcio kaj Wimmer de fervojistaj grupo esperantista. Kantistoj de ĉefirparejo kantis esperantlingve la „Internacion“ kaj „Matenvokon“. Poste salutparolis mallonge ĉiuj gastoj. Pri la detala grupkaj kasraportoj referis k-do Berdan: La grupo instalas 3 komencantajn kursojn kun 59 personoj. Ĉiŝaŭde okazas grupvespero. Enspezoj S 455'43, elspezoj S 430'80, saldo S 24'63. Membrostato 29 anoj. Kontrolo raportis pri bonordo. K-do Berdan faris paroladon pri fondo de „aŭstria sekcio“ de Internacia Federacio de Esperantistaj Trafikaj Transportlaboristoj, kune kun la fervojistaj grupo. K-do Wimmer de la fervojistaj grupo sciigis, ke la fervojistoj en sia jarkunveno la 27an de januaro aprobis ankaŭ unuanime la kunigon en aŭstria IFETT-sekcio. Oni mallonge diskutis pri ĉi tiu temo, poste estis unuanime akceptita tiurilata propono. La sekcianoj restas samtempe membroj de ALLE. La novelektaj sekvigis jenan rezulton: estro Kacimbersky, sekretario Berdan, kasanto Jilka. Grupadreso estas: Wien XIX, Geistingergasse 1, 6/16.

Instruista Fakgrupo (VIII, Langg. 20). La 15an de Aprilo parolis k-do d-ro Jökl pri „La

sociaj idealoj de la antikva tempo“. Komenco je 19a. Gastoj bonvenaj!

Wiener-Neustadt. Nia jarplenkunveno okazis la 28an de Januaro. La grupo eldonis dum pasinta jaro propran „Sciigfolion“. Okazis 10 estrarkunvenoj kaj 50 grupvesperoj vizititaj de 1012 anoj kaj 32 gastoj, dum kiuj 3 k-dinoj kaj 11 k-doj faris 32 paroladojn kaj 3 prelegojn, krome estis aranĝita komuna legado de aktoraĵo. Kiel gastoj parolis gek-doj Klatil el Amsterdam, kaj k-do Zink el Vieno dufoje faris lumbildparoladon. Kvarfoje ekskursis la grupo kune kun najbaraj grupoj. Krom la grupvesperoj estis aranĝitaj dum la monatoj Aprilo ĝis Aŭgusto konversaciaj vesperoj ĉiusemajnaj. En aŭtuno komenciĝis en nia urbo du kursoj por komencantoj kun kontentiga sukceso. La biblioteko kreskis per 20 novaj libroj al 171 libroj kaj estis uzita de 48 anoj (inter ili 14 inoj), kiuj legis 119 librojn 244-foje. La grupo nun nombras 72 anojn. Post la raportoj parolis k-do Weinhengst el Vieno pri la nuna stato de la laborista E-movado tutmonda. La novelektito rezultis: estroj Schmid Gustav kaj d-ro Fischer Rudolf, sekretario Kurt Benzien, protokolantino k-dino Königberger Emmy, kasanto Eder kaj Schüngerl, kontrolantoj Christament kaj Pittner. Grupadreso: K-do Schmid Gustav, Wr.-Neustadt, Wöllersdorferstr. 25/2.

Notoj**Laborista Kantfesto en Budapest**

La tramistaj kantistoj de Vieno aranĝos dum pentekosto ekskurson al Budapeŝt okaze de granda laborista kantfesto. Tiun ekskurson partoprenas ankaŭ la tramista ALLE-grupo kaj ĝi invitas ĉiujn gek-dojn al tiu vojaĝo. La prezo por ĉio (veturado tien kaj reen, noktigo, manĝado ktp.) estas S 40.—. Forveturo sabate, la 14an de Majo, tagmeze de la orientstacidomo per aparta rapidvagonaro. Reveturo lunde, la 16an de Majo, je la 18a vespere. Oni ankaŭ sola povas reveturi ĝis 23an de Majo. Informoj pri la tre interesa programo kaj anoncoj ĝis 18an de Aprilo ĉe: K-do Lechner en la ĉeflaborejo XIV, Siebeneichengasse (ĉiutage ĝis la 17a); kursejo XIV, Iheringergasse 27 (ĉiumerkrede); grupejo XIV, Winkelmannstr. 28 (ĉiŝaŭde post la 17a). — Dum la festo la tramistaj k-doj ankaŭ kantas esperantlingve kelkajn kantojn.

Danko. Okaze de la 75a datreveno de mia naskiĝtago mi ricevis multajn gratulojn de karaj gek-doj kaj estas mia kordeziro, esprimi mian sinceran dankon pro tio al ĉiuj.

Albine Multrus, Wien XXI.

Voĉoj de la legantoj

„Nia malgranda grupo ankaŭ esprimas sian ĝojon pri la pligrandiĝo de la gazeto. Same nia kontento pri ties enhavo pligrandiĝis. Precipe la paĝo por la lernanto laŭ nia opinio estas tre interesa. Belaj bildoj ankaŭ plaĉas al la leganto kaj ni esperas, ke de tempo al tempo aperas tiaj. Ni ĉiam kunlaboros, kiom ni povas...“

ALLE-grupo Gföhl.

Sciigoj de SEA-estraro

Geschäftsstelle: Frankfurt a. M. 21
Heerstraße 85.

Kiel novajn en nia asocio la estraro kore salut- as per Amikecon sekvantajn grupojn:

Bielefeld, Ottendorf i/Sa., Wiesbaden, Brand-Erbisdorf kaj Stollberg i/Sa.

Unuopuloj aliĝis el Grifte, Bez. Kassel, kaj Großsachsenheim.

An die Gruppenkassierer!

Die Abrechnungsformulare für das 1. Quartal 1932 sind in den Händen der Kassierer. Wir ersuchen die Genossen dringend, im Interesse einer geordneten Geschäftsführung die Abrechnungen genau auszufüllen. Die Gruppen, die anfangs des Jahres noch alte (einfarbige) Marken geklebt haben, müssen diese Marken auf einem besonderen Blatt abrechnen. Auf dem neuen Abrechnungsformular dürfen nur die neuen Marken verrechnet werden. Außerdem möchten wir darauf hinweisen, daß mit der Abrechnung auch alle zurückliegenden Rechnungen bezahlt werden müssen.

Hoffmann, Bundeskassierer.

Naturamikoj!

La junularo de Naturamikoj grupo Mannheim volas aranĝi biciklan veturadon al Francio komence de Majo. Okazos internacia pac-demonstracio sur la bataalkampo de Verduno. Estos parolata france, germane kaj esperante. Forveturo el Mannheim la 5an de Majo. Gek-doj, kiuj volas partopreni (precipe gejunuloj), skribu al k-do Karl Roth, Mannheim-Neckarau, Friedhofstr. 5. K-do Roth estas SEA-ano kaj donas ĉiujn informojn.

Atentu, Renkontiĝo en Durlach!

La mezbadena laborista esperantista renkontiĝo estas prokrastita je 24an de Aprilo. Por ĉiuj anoncoj lasta templimo 20a de Aprilo, al mia adreso: August Weiler, Durlach i/B., Pflinzstr. 99.

Kantaro.

La komuna kantaro por ALLE kaj SEA baldaŭ aperos. Espereble la gek-doĝoj ĝin bonakceptos. Ĝia amplekso estas limigata, ĉar ni devis fari kompromison inter amaso de materialo kaj amplekso de la libro, kies prezo devis resti en certaj limoj. Multaj bonaj kantoj ne povis esti uzataj. Ili kuŝas en mia mapo. Eble nova eldono dum pli favora tempo ebligos ilian uzon. Laŭeble mi publikigos parton de la kantoj iom post iom en la „Socialisto“. Dankon al ĉiuj sendintoj. Kaj se iufoje vi havas novan materialon — novajn tradukojn — sendu ilin al mi.

Adolf Sproeck.

Atentu, raportantoj! Grupraportoj devas esti sendataj ĝis 15a de la monato al: K-do Adolf Sproeck, Berlin N 58, Choriner Str. 45. Ne sendu ilin al la redakcio en Vieno kaj ankaŭ ne al Frankfurt.

Grupraportoj

Distrikto Berlin - Brandenburg. Ĝojiga estas la rezulto de SEA-laboro en la provinco Brandenburg. SEA havas grupojn en Berlin, Eberswalde, Forst, Guben kaj Potsdam, krom tio ekster la provinco en Stettin. Ni konstata, ke krom en Berlin kaj Stettin, laŭfame ankaŭ en Forst ne plu ekzistas LEA-grupoj en la distrikta regiono. Menciinda estas la laboro de

grupo Potsdam, kiu dum aŭtuno lastjare malfermis kurson kun pli ol 30 personoj, kiu — laŭ Ĉe-metodo — bone progresis kaj nun al la grupo donos novan antaŭenpuŝon. Grupo Berlin fondis sian unuan infanĝrupon el infanoj de senreligia lernejo (617 infanoj) La fondo de pluraj grupoj estas intencata. Post kelktempaj klopodoj: parolado de k-do Sproeck antaŭ partifunkciuloj, paroladetoj en partiaj kunvenoj, la grupo povis malfermi kurson por senlaboraj partiaj k-doĝoj. Grave estas, ke la kurso estas tute senkosta, eĉ lernolibroj kaj kajoj estas liverataj. La kurso estos fundamenta por plua laboro en SPD. — Grupo Stettin vekigis el dumvintra dormado. Strange! Kutime la esperantaj grupoj dormas dum somero. Tamen, gratulon al Stettin! — Distrikta estro estas k-do Bruno Sproeck, Berlin N 58, Wörther Str. 41. Distrikta sciigilo estas eldonata. Ĝin redaktas k-do Adolf Sproeck. Aliaj distriktoj eldonantaj sciigilojn estas petataj, sendi interŝanĝe al k-do Adolf Sproeck siajn sciigilojn.

Düsseldorf. La 8an de januaro okazis nia nunjara ĝenerala kunveno. El la raporto de la estraro la jeno estas rimarkinda. Post la asoci- tago de LEA en Essen montriĝis, ke ĝi pli kaj pli fariĝis partikomunista organizaĵo. Al la ne-komunistaj gek-doĝoj ne plu estis eble, labori por tia asocio. Tial la grupo Düsseldorf en eksterordinara kunveno, okazinta dum aprilo pasintjara, decidis per 38 kontraŭ 20 voĉoj aliĝi el LEA kaj aliĝi al SEA. Kursoj por komencantoj komenciĝis en la urbopartoj Gerresheim, Oberkassel, Wersten kaj pere de ADGB en la popola altlernejo. En Oberkassel fondiĝis subgrupo, kies prezidanto estas k-do Neuburg. La kasraporto montris, ke ankaŭ nia grupo suferas pro la mizera ekonomia stato. La novelekto de la estraro havis jenan rezulton: prezidanto k-do Pillekamp, kasisto k-do Hallen, sekretario k-do Schneider.

Guben. La 18an de januaro okazis la jara ĉefkunveno. La estro donis raporton pri la gruplaboro, ni aliĝis al SEA, forlasis nian grupĉambron en gastejo, ĉar ni ricevis senkoston ĉambron en junulhejmo dank' al la helpemaj socialdemokratiaj k-doĝoj. Ni aranĝis varban vesperon por nova kurso. Partoprenas 8 komencantoj. La financa stato de la grupo pro la krizo estas malbona. La malnova estraro estas unu- anime reelektita.

Hagen (Westf.). Unu jaron nun ekzistas la SEA-grupo. Dum la aŭtuno ni starigis junular- kaj ekskursgrupon, kaj pro tio ni povis aliĝi al la ŝtata komitato por junulara prizorgado. Per tio ni ĝuas 50procentan rabaton fervojan dum ekskursoj. Krom tio ni apartenas al „Laborista Kulturkartelo“ kaj lastatempe ni aliĝis al „Fera Fronto“.

Heidelberg. La grupo faris laste sian jar- kunvenon. La agemo de la grupo ege kreskis, precipe dum lastaj monatoj. Krom serio da kursoj por komencantoj kaj progresintoj en Heidelberg, la grupo malfermis samajn kursojn ankaŭ en multaj lokoj de la ĉirkaŭaĵo (7). La cifero de la kursanoj kaj interesiĝantoj superas jam 200. La nunjara Esperanto-festo en la domo de laboristaj sportuloj havis grandan sukceson. K-do Prof. Dr. Ĉahotin faris paroladon pri „Mondlingvo kaj la laboristaro“ en multaj lokoj de la Heidelberga distrikto. Laste li faris sciencan paroladon en la Naturhistoria kaj Medicina Societo de Heidelberg kaj rekomendis uzi Esperanton en scienco. En diversaj lokoj de la urbo la grupo pendigis kestetojn kun varbskribaĵoj, informoj kaj ilustritaj poŝtkartoj pri Esperanto. La grupo malfermis ankaŭ ekspozicion de ĵurnaloj kaj prospektoj en Esperanto el ĉiuj landoj. Kiel prezidanton la grupo reelektis k-don Schreiter, kiel sekretariojn k-don Löschmann, kasiston k-don Mayrhöffer.

Lindau (Bodensee). Nia jarkunveno okazis la 14an de januaro. La senlaboreco malhelpas ĉiun poresperantan laboron. Tamen la grupo vivas kaj laboras, por ke ni estu pretaj kiel funkciuloj sub

revenontaj pli favoraj cirkonstancoj. La grupo mem ekzercas diligente en regulaj vesperoj, dum kiuj oni pritraktas ekz. eksterlandajn korespond- aĵojn, diversspec-ajn enigmojn (krucvortludojn, kalkulajn ludojn, geografiajn aferojn ktp.). La estraro ĝisnuna estis reelektita; nur pro alilokiĝo de nia ĝisnuna bibliotekisto oni devis elekti novan. La kotizojn ni povis malaltigi, dank' al la ankoraŭ kontentiga stato de nia grupa kaso.

Stettin. Nia lasta grupkunveno okazis la 22an de februaro. K-do Höppner raportis, ke mortis nia k-dino Kurter. La grupo estis sendinta delegiton kun florkrono al la enterigo. Kasraporton donis k-do Wold. La kasostato ne estas tro brila, sed laŭ la ekonomia krizo sufiĉe kontentiga. La kunveno decidis, ke la kasanto sendu parton de nia pagdevo al la distrikta kaso. Parto de la k-doĝoj tuj mendis la novan junulgazeton „Antaŭen“. Nia grupo nombras nun 15 anojn. La nove elektita estraro konsistas el jenaj k-doĝoj: prezidanto Höppner, kasanto Wold, sekretario Meta Neumann. Ĉiujn sendaĵojn sendu al: K-do F. Höppner, Stettin, Friedebornstraße 31.

Wiesbaden. La 29an de februaro okazis la kunveno de la libera laborista Esperanto-grupo Wiesbaden. La novfondita grupo elektis la estraron: estro Theodor Dorn, kasanto Willi Köhler, sekretario Th. Dorn. La grupo nun aliĝis al SEA. Grupadreso: Theodor Dorn, Wiesbaden, Jahnstraße 24 pt.

El la gazetaro

L' Etudiant Socialiste, enhavas artikolon pri la socialistaj studentoj en Aŭstrio, ricevit- an per E-korespondado de nia k-do R. Jonas.

„Vorrui“, Gento, en n-ro 46 de 16. II. publi- kigas la enhavon de nia februara numero. Ni speciale ĝojas pri tiu sukceso.

„Der Sozialdemokrat“, la oficiala orga- no de la Viena socialdemokrata partio, n-ro 3, represas noton pri la japan-ĉina milito, kiun ĝi ricevis de ALLE-gazetservo. Sed bedaŭrinde oni tute ne mencias la vorton Esperanto. Kial?

En „Der jugendliche Arbeiter“, Wien, n-ro 3, aperis longa artikolo pri Esperanto „Wie eine Weltsprache entstand“ (Kiel ekestis mon- dlingvo de k-do F. Jonas. Tio certe helpas al ni en la propagando inter ĝeunuloj. Malrapide, sed tamen ni enpenetras en la soc. organizaĵojn.

La gazetarservo de la ALLE-grupo Linz suk- cesis konstante aperigi en „Linzer Tagblatt“ di- versajn E-notojn kaj novaĵojn, eĉ la grupan pro- gramon kaj tradukitan artikolon el „Oomoto“. Pro tiu sukceso niaj Linz-aj k-doĝoj meritas speci- alan gratulon.

„Svenska Arbetar-Esperantisten“, n-ro 3, preparolas la pligrandigon de nia gazeto kaj laŭdas ties enhavon.

Bibliografio

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

La Krizo. Iom el la aktuala politiko. Verkinto kaj eldoninto ne montritaj (laŭaspekto eldonaĵo de Ekrelo), Leipzig. 23 paĝoj, prezo M 0.15.

Temas pri laŭdego de la socialismaj faroj en USSR kaj mallaŭdo de la ekonomia krizo tut- monda. Kaj ripetita ĝis naŭzo aserto, ke kulpa je ĉio estas socialdemokratio, socialfaŝistoj! Jesja, se pluas — kulpas socialdemokratio; se komu- nisto suferas je disenterio — kulpas socialdemo- kratio; se nun en Germanio regas Hindenburg, kio permesas laŭleĝan ekziston de komunistaj organizaĵoj, se per la lastaj elektoj Hitler ne iĝis regna prezidanto kaj do ne povas sufoki la laboristajn organizaĵojn — estas kulpo de so- cialdemokratio. Ĉi lasta estas vero — kaj pruvo, ke estis trostreĉita la komunist- insultbatalo kontraŭ socialdemokratio! Aso.

